



Lillo: Mi fieris stari antaŭ 2500 homoj

Brajtono • Endoma prilumado • Lernu!-kursoj

- 5 • Ni dankem(m)as!**
al Emma Hudson
- 6 • Simpatias la indiĝenoj**
Mikaelo Heary pri la somerfestivalo
- 7 • Kune karibe ... en Preston**
NOEF kunvenis
- 8 • En Brajtono la ĝusta tono**
Mikaelo Sims pri la brita kongreso
- 11 • Kvin tagoj da Esperanto en Liverpoolo**
Angela Tellier invitas al la Majstroklaso John Buchanan
- 12 • Kuratore en Barlastono**
kie la administra komitato kunsidis
- 14 • Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?**
Ian Carter pri si
- 18 • Beleco elspiriga**
Geoffrey Sutton memoras Ĉinion
- 20 • Venis nova cento**
Hilary Chapman kaj Ian Carter ĉeestis la 100-an UK
- 24 • Lernu!-kursoj en Barlastono**
el kiuj Mia Hewitt partoprenis unu
- 28 • Riko la rano**
Joyce Bunting rakontas
- 30 • Recenzo: Sen elizi'**
Paul Gubbins
- 31 • Endoma prilumado**
Jack Warren prelegas
- 37 • Babile**
Paul Gubbins
- Kovrila foto**
Nome de EAB, Ian Carter salutis pli ol 2500 esperantistojn en salono Zamenhof dum la Universala Kongreso en Lillo. Fotis Andrea Marshall.

redaktis: **Paul Gubbins**

paul@gubbins.org.uk

3 Arden Court, Mossley, Congleton, Cheshire, CW12 3JH

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**

eab@esperanto.org.uk

Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE

telefone: +44 (0)1782 372141

aŭ en Britio: 0845 230 1887

fakse: 01782 372393

retejo: **esperanto.org.uk/lbe**

ISSN 0007-067X

fasonis: Ava Rowell

enpaĝigis: Simon Davies

presis: Panda Press

limdato por la printempa numero:

29 februaro 2016

La Brita Esperantisto kaj EAB Update estas eldonataj entute ses fojojn jare. Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB. Nemembroj povas aĉeti LBE de la EAB-libroservo en Barlastono.

Ni normale ne akceptas paperajn kontribuojn.

Kontribuoj estu sendataj elektronike kiel ODT, DOC, RTF, aŭ plata teksto.

Fotoj estu kunsendaĵoj, apartaj de la akompana teksto.

Fotoj aperintaj en LBE ne estu represitaj en aliaj publikaĵoj, ĉu paperaj, ĉu elektronikaj, sen permeso de la redakcio de LBE kaj ĉiaokaze sen fontindiko.

EN LA LASTA numero de *La Brita Esperantisto* mi menciis, ke la estraro de Esperanto-Asocio de Britio (EAB) konsideras, pro ĝenerale malalta partoprenado en naciaj kongresoj, ĉu nuligi semajnfinan eventon tian kaj ĝin anstataŭigi per ekzemple duontaga jarkunsido/prelego. Mi petis, ke legantoj prikomentu.

Mi ricevis dek komunikaĵojn, kaj interretajn kaj poŝtajn. Kelkaj respondintoj diris, ke ili ne plu ĉeestas pro malsano aŭ maljuniĝo, sed ĝenerale subtenas la nocion de ĉiujara kongreso. Aliaj kontraŭis: “Mia opinio estas, ke nacia kongreso de internacia lingvo estas preskaŭ sencela.”

Aliaj tamen apogis: “... kiam plejparto de lokaj organizaĵoj ne plu havas regulajn kunvenojn, la landa kongreso restis la plej grava evento, kiu kunligas person-kontakte esperantistojn de la lando kaj tenas ilin ligitaj kun la movado. Anstataŭigo de la kongreso per unutaga formala laborkunveno de la asocio estus tre danĝera risko, puŝanta la asocion al la direkto de elmortado.”

Aŭdiĝis aliaj voĉoj: “... mi preferus partopreni eksterlandan kongreson, kie oni vere bezonas uzi Esperanton, ol renkontiĝi kun

Kio povas ...

samideanoj, kun kiuj mi pli bone povus komuniki per la angla, ĉar multaj el ili, parolinte iomete en Esperanto, krokodilas.” Ho, ve. Kara ... ĉu lastatempe vi ĉeestis francan aŭ italan kongreson? Kontraste, la niaj malkrokodile modelas.

Kiam tamen leviĝis la demando dum la ĉi-printempa brita kongreso en Brajtono, ĉiuj forte argumentis, ke nepras teni vivaj enlandajn kongresojn, eĉ se eblas allogi – spite al heroaj klopodoj de Viv O’Dunne kaj Tim Owen, kaj aliaj, elekti elstarajn kongresejojn en interesaj urboj kontraŭ relative malaltaj prezoj – nur kvindek da homoj.

Do, almenaŭ provizore, restos la enlandaj kongresoj, kun prelegoj, distraĵoj, diskut- kaj komencantorondoj, libroservo, ktp. Mi substrekas tamen “provizore”. Se membroj decidus, pro sia foresto, ke kongresoj ŝajne ja superfluas, nepros remalfermi la demandon. La asocio ne povas daŭre tiel perdi monon – kaj dediĉi horojn da homfortoj al afero kredeble pli kaj pli kroma, kiam restas amaso da aliaj, eventuale pli urĝaj farendaĵoj.

Pretendoj pri la valoro de Esperanto kredeble neniam ĉesos. Jen mi, naivulo, opiniante, ke oni ne plu serioze proponas, ke inter la virtoj de nia lingvo listiĝas la eblo ĉesigi militojn. Se homoj de malamikaj nacioj povus rekte alparoli unu la alian – tiel la argumento – do ili pli bone interkompreniĝus kaj ne volus interbatali. Ĉarma revo ... sed ĝuste tia: revo.

Tamen en la junia numero de la UEA-revuo *Esperanto* mi legas eĉ pli sensaciajn (kaj sensencajn) pretendojn. En raporto pri la tria tutmonda kolokvo pri la instruado de Esperanto, okazinta mezmaĵe en Svislando, mi notis, ke unu el la prelegintoj “skizis, ke Esperanto povus ludi rolon en ... ok celoj” (p. 141). Esperanto povus do interalie “elradikigi eksterordinaran malriĉecon kaj malsaton ... redukti la nombron de infanaj mortoj ... kontraŭbatali HIV/aidoson, malarion kaj aliajn malsanojn.”

Verdire mi devis min pinĉi por certigi, ke mi ne sonĝas, kaj kontroli la kalendaron, por vidi, ĉu temas pri aprila ŝerco. Efektive ne. Tamen ĉu ridi, ĉu plori, mi ne scias. Nu, klare, mi ne ĉeestis la prelegon por aŭdi la argumentojn. Mi povas nur konjekti, eble erare, ke tiel la rezonado: se patrinoj, ekzemple,

scipovus Esperanton, ili povus ricevi konsilojn en la internacia lingvo, kiel pli sekure naski bebojn; simile tiuj elmetataj al aidoso aŭ malario.

Sed, pardonu min, “*povus*-oj” tiaj ridindigas Esperanton.

Se mi anoncus al mia najbarino, flegistino, ke Esperanto povus redukti

la nombron de infanaj mortoj, ŝi taksus min eĉ pli freneza, ol ŝi min nun kredas. Aŭ la Esperanto-panaceon proponu al via kuracisto, dum via venonta vizito. Facile imageblas la reago.

Krome notindas en la kolokvo-raporto, samkolumne, du aliaj *povus*-oj, elbuŝigitaj de aliaj fantaziuloj, pardonu denove, kutime seriozaj esperantistoj: iu parolis pri la superreĝo de la angla kaj prezentis “pensojn, kiujn rolojn Esperanto povus ludi en la [eŭropa] komunumo”; alia prelegis pri la rolo, “kiun Esperanto povus havi kiel lingvolanĉilo”.

Gravas *povus*-oj. Sen *povus*-oj, nenia progreso. Tamen ili estu realigeblaj. Mi kredas, ke jam de tro longe ni esperantistoj prezentis *povus*-ojn kiel *povas*-ojn, do revojn kiel realojn. Nepras maturiĝi, honeste kaj realisme alfronti eblojn, ne bobelojn, kaj super ĉio rezigni pri kapricoj kolokve aŭ science vestitaj.

Ke Esperanto povus redukti la

... kaj kio povus

Ni dankem(m)as!

En aŭgusto ni adiaŭis nian oficejan asistanton **Emma Hudson**, kiu dum pluraj jaroj partatempe deĵoris kun Viv O'Dunne en la EAB-sidejo en Barlastono. Emma montris sin ĉiel kapabla kaj helpema, kaj preta labori, kiam necese, pli ol la laŭkontraktajn horojn.

Emma akceptis plentempan administran postenon ĉe Sugden Walled Garden, en Stafordŝiro, kie ŝi respondecos pri organizado de nuptofestoj kaj aliaj tiaj eventoj. Ni deziras al ŝi ĉiun sukceson kaj dankas pro la fidela laboro por Esperanto-Asocio de Britio.

EAB-sekretario Tim Owen veturis al Barlastono por persone danki al Emma kaj, dum ŝia lasta laboro-tago, EAB-prezidanto Paul Gubbins prezentis al ŝi grandan florbukedon kaj nome de la asocio tagmanĝe ŝin regalís. ■



nombro de infanaj mortoj ... aŭ jes, analoge, se spac-inĝenieroj uzus la lingvon, ĝi povus ebligi al ni atingi Marson, se bankistoj ĝin adoptus, ili povus nin eĉ pli efike ekspluati ... nu, bonvole ne ridigu min. Kaj ne tiel ridindigu Esperanton per stultaj, fantaziaj pretendoj.

Fine ...

Fine, se vi estos en Liverpolo la 22-an de oktobro, nepre direktu

vian paŝojn al la universitato. D-rino **Angela Tellier** prelegos tie pri la esperanta pionoro W. E. Collinson, kiu profesoris pri la germana en la Liverpola universitato.

La titolo de la prelego, kiu komenciĝos je la 16-a horo (verŝajne en la universitata biblioteko) estos: "W. E. Collinson: German, Esperanto and Interlinguistics at the University of Liverpool". ■



Kiu estas fraponta la kapon de **Joan Butler** (dekstre en la foto)? Karte puzzle kun **Liz Tuckwell** kaj **Andrea Schmidt** ne meritas traktadon tian!

IMAGU, ke vi veturas tien, kie Esperanto estas la kutima ĉiutaga lingvo, kie dum la manĝohoroj eblas akiri novajn vortojn, kaj kie la simpatiaj, indiĝenaj esperantistoj volonte vin helpas pri sia lingvo.

Tiel estas en Shallowford ĉe la somera festivalo, aŭ somerlernejo, de EAB.

Funkcias du grupoj dum la ĉiutagaj sesioj: unu por lerni la lingvon, celanta tiujn, kiuj ekpaŝas, uzante ĉi tiun fascinan lingvon (gvidis **Jack Warren**);



la alia, celanta pli spertajn studentojn, esploras esperantajn literaturon kaj kulturon per nuntempaj kaj historiaj studmaterialoj (gvidis **Paul Gubbins**).

Kuniĝas dum manĝohoroj la du grupoj, kaj ankaŭ

por kune viziti la librejon kaj bibliotekon de EAB en Barlastono, kaj por sin distri.

Ĉi-jaron malmultnombris la partoprenantoj; ni tamen bone amuziĝis kaj profitis de la ĉeesto de gasto el neangleparolanta lando. ■

Ripozantaj en la ĝardeno ĉe Shallowford House estas, de maldekstre, **Joan Butler**, **Andrea Schmidt**, **Liz Tuckwell**, **Joyce Bunting** kaj **Jack Warren**.

Kune karibe ... en Preston

MEMBROJ de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio (NOEF) kunvenis en Preston en majo okaze de sia printempa renkontiĝo. Kunmanĝinte laŭ kariba stilo ĉe restoracio Kelonio-Golfo (*Turtle Bay*), ili paŝis nur kelkajn metrojn al la kunvenejo ĉe Harris-muzeo kaj -artgalerio.

Prelegis **Brendan Marsh** pri la bonfara organizaĵo *Human Writes*, kies membroj leteras al mort-kondamnitaj en Usono. Brendan

diris, ke prizonuloj en Usono estas foje enkarcerigitaj ĝis 23 horoj tage. La leteroj do ebligas, ke prizonuloj povas “dialogi” kun homoj preter la severa punsistema mondo. *Human Writes*, laŭ Brendan, ne celas juĝi la prizonulojn, kies familioj foje estas rompintaj ĉiun kontakton kun la kondamnito. La leteroj montras, ke ili ne estas tute forgesitaj.

Sekvis vizito al la apuda artgalerio kaj muzeo. ■



Jorkŝiran gaston, **Simon Whiteley**, (sidantan) bonvenigas al Preston NOEF-prezidanto **Peeter Aitai**.

PARTOPRENIS la ĉi-jaran EAB-kongreson en Brajtono 59 homoj ne nur el enlando sed ankaŭ el eksterlando. Kreskis la partopren-antaro kompare kun la pasintjara kongreso en Sheffield. Ĉar mi mem loĝas sufiĉe proksime, en Krojdono, mi elektis pendolveturi tri fojojn per vagonaro kaj evitis la bezonon mendi hotelon.

La programo estis interesa kaj vigla. Vendredon nia prezidanto **Paul Gubbins** bonvenigis nin kaj parolis pri siaj impresoj pri la Universala Kongreso de 1989 okazinta en Brajtono kaj pri la forpasinta urba esperantistino **Karolina Gilmore**. Sekvis bufedo.

Tri fojojn prelegis la invitita eksterlanda gasto, nome la poeto **Jorge Camacho** (fotita supre), el Hispanujo. Li parolis pri Esperanto-poezio kaj voĉlegis poemojn el siaj propraj libroj. Li menciis interalie, ke plaĉas al li verse eksperimenti. Ekzemple li preferas hajkon ne el la tradiciaj kvin, sep kaj kvin silaboj sed el sep, kvin kaj sep. Ankaŭ pri interpretado kaj pri la "senco"

okupiĝi pri Esperanto en la 21-a jarcento li prelegis.

Samtage, dum **Julia Hédoux** varbis por la ĉi-jara universala kongreso en Lillo, Paul Gubbins gvidis sesion pri kiel verki por loka ĵurnalo. Posttagmeze varbis **Tim**



Morley por Somera Esperanto-Studado dum, paralele, **Ian Carter** okazigis sesion por komencantoj. **Jack Warren** aranĝis ankaŭ duhoran muziko-sesion, kiun partoprenis ses interesatoj kun diversaj instrumentoj. Finiĝis la tago per prelego de **Tim Owen** pri la genezo de la nova

EAB-emblemo kaj, vespere, per komedia kvizo gvidata de **Rolf Fantom**. Heroe partoprenis Tim Morley, Ian Carter, **Ed Robertson** kaj Jorge Camacho, kiuj ekzemple devis rakonti, por ke la aliaj divenu, ĉu veras aŭ malveras la priraportitaj okazintaĵoj. Aŭdiĝis multe da frenezaĵoj.

Dimanĉon okazis la jarkunsido de EAB. Reelektitaj al la administra komitato estis Edmund Grimley Evans, Paul Gubbins, Clare Hunter, Tim Owen kaj Ed Robertson, al kiuj unuafoje aliĝis Ian Carter kaj Paul



Ian Carter kaj Tim Morley

Dennett. Diskutata estis la demando pri la valoro estontece okazigi jarkongresojn. Mi akiris la impreson, ke la plimulto de ĉeestantaj membroj subtenas la ideon pri kongresoj. Tamen restas la problemo, ke mankas volontuloj pretaj helpi plani renkontiĝojn tiajn. Finiĝis la kongreso en urba restoracio, kiam dudeko da esperantistoj kunmanĝis en amika etoso.

Resume, la evento tre sukcesis. Mi forte esperas, ke okazos kongreso denove en 2016 [*jes, en Liverpolo, 18-20 de marto, tuj post tri-taga Buchanan-seminario ĉe la universitato - Red.*] kun eĉ pli da partoprenantoj. ■



Jack Warren kaj Miland Joshi



**Lenio Marobin kaj
Graham Blakey**



Supre: **Russ Jenkins,
Ed Robertson
kaj Mikeo Seaton**



**Philippe de Vos
kaj Kevin Bourne**

TUJ ANTAŬ la **Brita Esperanto-Kongreso** en Liverpoolo (18-a ĝis 20-a de marto 2016) okazos la **John Buchanan Masterclass** (16-a ĝis 18-a de marto) ĉe la Universitato de Liverpoolo. Do entute kvin tagoj da Esperanto: seminarioj kaj prelegoj pri aspektoj de Esperanto (kulturo, lingvo, literaturo) plus lingvo-instruado ... kaj ĉio ĉi en urbo, en kiu abundas interalie altrangaj muzeoj kaj galerioj.

Ne necesas ĉeesti dum ĉiuj kvin tagoj (sed ni esperas, ke oni kaptos la okazon por mergiĝi en esperanta medio), ĉar la seminarioj kaj la kongreso estas sendepende organizataj.

La majstroklaso estas intensiva studseminario, kiu celas ne nur esperantistojn sed ankaŭ ne-esperantistojn, ekz. universitatajn studentojn kaj membrojn de la publiko, kiuj volas lerni iom pri Esperanto. Okazos tri tiel nomataj “fadenoj” aŭ ĉeftemoj, kaj partoprenantoj en la Buchanan-evento povas, se ili volas, pendoli inter ĉiuj tri.

Jenas la fadenoj:

1. **Esperanto-kulturo:** por spertaj esperantistoj, ekzemple legantoj de *La Brita Esperantisto*.

Gvidos po kvar sesiojn pri esperantaj vivo kaj kulturo profesoroj **Duncan Charters** kaj **Renato Corsetti**. La temaro inkluzivos tradukadon, instruadon kaj edukadon, lingvaĵon kaj la tiklan problemon: kio ja estas Esperanto-kulturo? La sesioj celas diskutigi, kunlaborigi kaj kunpensigi partoprenantojn.

2. **Lingvo-lernado:** ĉefe por komencantoj kaj post-komencantoj. Ĝin gvidos **Anna Löwenstein**, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de la romanoj *La ŝtona urbo* kaj *Morto de artisto*. Partoprenantoj studos kaj praktikos bazajn elementojn de Esperanto.

3. **Esperanta literaturo:** celataj estas esence anglalingvanoj (sed esperantistoj estos bonvenaj). Pere de la angla lingvo, d-ro **Paul Gubbins** prezentos kaj diskutigos tradukitajn specimenajn tekstojn el sia dulingva antologio *Star in a Night Sky*. Komplemente, profesoro **Wim Jansen** instruos kvar-sesian kurson pri gramatiko, pritraktante aspektojn de Esperanto surbaze de ekzemploj el tekstoj uzataj en la literaturaj seminarioj.

Aldone, kaj aparte por studentoj de la hispana ĉe la liverpola

Kuratore en Barlastono



KUNSIDIS ĉe Biblioteko Butler en Barlastono unu semajnon post la brajtona kongreso membroj de la administra komitato de Esperanto-Asocio de Britio. Bonvenigitaj al la dutaga kunsido estas nove alelektitaj membroj **Paul Dennett** kaj **Ian Carter**. Diskutis komitatanoj novan EAB-retejon, ĝisdatigatajn kaj ĝisdatigotajn kursojn kaj ekzamenojn, la bibliotekon, kaj venontajn kongresojn.

Ili aŭdis per skajpo raporton de **Angela Tellier** pri ŝiaj esplor-

EAB-kuratoroj en Barlastono: de maldekstre **Edmund Grimley Evans**, **Tim Owen**, **Ed Robertson**, **Paul Dennett**, **Clare Hunter**, **Ian Carter** kaj **Paul Gubbins** kun, inter Paul Dennett kaj Clare, EAB-administranto **Viv O'Dunne**.

projektoj, kaj aplaŭdis aparte ŝian iniciaton aperigi libreton pri la vivo de notindaj britaj esperantistoj kaj iliaj kontribuajoj al Esperanto. La libro sekvu la formaton de la jam publikigita kaj modela historio pri la brita Esperanto-mecenato John Buchanan.

universitato (sed ne nur) profesoro Charters prelegos en la angla pri hispana literaturo kaj vivo: “Issues in translation: Cervantes and Lorca in English and Esperanto” kaj “How Catalan Esperantists kept Catalan literature alive outside Spain in the post-Civil War period”.

Resume, la majstroklaso estas ducela: prezenti niajn lingvon kaj kulturon en racia, sencohava, interesa kaj alloga maniero al la ekstera publiko, kaj ebligi al spertaj Esperanto-parolantoj plibonigi lingvosciojn kaj plivastigi kulturajn horizontojn. Venu, diskutu kaj disputu!

Pliaj informoj pri la majstroklaso troveblas ĉe la retejo espinfo.org/masterclass-liverpool. Pri la kongreso aperos informoj kaj en *Update* kaj ĉe la retejo de Esperanto-Asocio de Britio (esperanto.org.uk). Interesatoj havantaj malpli ol 26 jaroj povas sin turni al la fonduso Norwich Jubilee

Esperanto Foundation (NoJEF) kaj informiĝi pri financa subteno (nojef.org/grants/travel-grants).

En 1930 d-ro **John Buchanan** testamentis £4000 al la Universitato de Liverpolo, kiu ebligis starigi fonduson por disvastigi kaj instrui Esperanton. En 2014 la universitato, kunlabore kun EAB, daŭrigis la 85-jaran – sed ne seninterrompan – tradicion kaj okazigis la unuan tritagan majstroklason ĉe la universitata konferencejo Foresight Centre. Surbaze de la seminarioj en 2014 kaj en 2016 estas preparata universitat-nivela kurslibro pri Esperanto.

La brita kongreso okazos ĉe alia konferencejo en Liverpolo, simila al tiuj en Ŝefildo kaj Brajtono: The Gateway Conference Centre (thegatewaycentre.org). Programo kaj pliaj informoj aperos en *Update* kaj ĉe la EAB-retejo. ■

Kunsidinte, opiniis EAB-prezidanto **Paul Gubbins** pri la semajnfino: “Jen tre pozitiva laborsesio. Mi vere sentas, ke danke al entuziasmaj kaj kapablaj komitatanoj, membroj tre baldaŭ rimarkos refreŝigitan, modernigitan asocion, kiu ekspluatas

plejlastajn elektronikajn, interretajn kaj aliajn rimedojn por pli efike antaŭenigi Esperanton en nia lando. Jam parte ĝueblas la fruktoj de tiu ĉi modernigo en la formo de la lastatempe relanĉitaj publikigaĵoj de la asocio, nome *La Brita Esperantisto* kaj *Update*.” ■

Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?

Ian Carter

JB Gratulon pro via elekto al la administra komitato de Esperanto-Asocio de Britio. Mi legis en via propra retejo, ke vi lernis Esperanton en tri monatoj. Ĉu vere?

IC Prave. Kiam mi havis 16 jarojn, mi lernis pere de *Teach Yourself Esperanto*, kiun mi hazarde trovis ĉe la urba biblioteko en mia hejmurbo. Trastudinte tiun libron, mi baldaŭ ekkorespondis kun nekonatoj en Hungarujo, Ĉinujo kaj Japanujo. Post kelkaj jaroj, mi fariĝis prezidanto de Junularo Esperantista Brita, aŭ JEB, pro kio la BBC intervjuis min ĉe la meztaga televidprogramo *Pebble Mill at One*. Mi ankoraŭ fieras, ke mi permane redaktis la JEB-revuon *Kial Ne?* [*Ties festa numero de 1978 troviĝas rete ĉe kialne.info - Red.*]

JB • Ĉu vi instruis viajn gefilojn pri Esperanto?

IC • La plej aĝa filino eklernis, sed ŝi rezignis. La plej juna filo pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto, kaj mi esperas, ke li eklernos ĝin - eble post la gravaj ekzamenoj (GCSE) venontjare. Li parolis kaj la birman kaj la anglan hejme

en Birmo. Sed kiam li havis ses jarojn, li kaj mi translokiĝis al Britujo. Alveninte, li tuj diris: "Ni estas en Anglujo, paĉjo; ni nun devas paroli la anglan."

JB • Ĉu vi iam instruis Esperanton?

IC • Certe. Antaŭ kelkaj jardekoj, mi havis enkondukan klason en Ĉesterfildo. Mi nun estas kursgvidanto de la *Free Taster Course* kaj la "Elementary...!"-kurso de EAB. Fakte, unu el miaj sukcesaj studentoj ĉeestas la britan kongreson, ĉi tie, je la unua fojo. Granda plezuro por mi renkonti lin!

JB • Ĉu aliaj lingvoj ĉiam interesas al vi?

IC • Jes, mi studis la hispanan kaj francan ĝis licenciĝo kaj instruis ambaŭ. Multe malplaĉas al mi iri al fremda loko kaj povi legi nek afiŝojn nek stratnomojn, ekzemple. Do mi iom lernis la araban, la tajanan kaj (pli plene) la birman dum restado en tiuj respektivaj landoj.

JB • Tiuj lastaj lingvoj havas interesan skribmanieron - ĉu malfacile por angleparolanto?

IC • La ekzotika skribsistemo de la araba fascinis min. Saman sperton mi havis en Tajlando – kvankam mi loĝis tie dum nur dek ses monatoj (1995–6). Denove, kiam mi iris al Birmo (aŭ Mjanmao) por instrui, la tiea skribsistemo kaptis mian atenton – tiom da etaj cirkloj rondirantaj unu la alian! Kiel tion legi? mi demandis al mi. Poste mi prilaboris specon de birma tiparo (*ICMyanmar*) por propra uzo. Post nelonge la surloka British Council adoptis mian sistemon, ĉar tiam ankoraŭ ne ekzistis birma unikodo kaj ĉar mia sistemo estis pli facila ol la ekzistanta sistemo, kiu kopiis la tradician tajpil-klavaron.

JB • Kion vi instruis en Birmo/Mjanmao?

IC • Plaĉas al mi instrui la anglan kiel duan lingvon, do *English for Speakers of Other Languages*, aŭ ESOL. Efektive, mi kunsentadas kun ne-denaskaj uzantoj de la angla lingvo. Pro miaj spertoj alilande, mi povas kompreni iliajn malfacilaĵojn.

JB • Muziko gravas en via vivo, ĉu ne?

IC • Jes, multe. Mi ludas iaspecan muzikan klavaron ekde la naŭa jaraĝo. Unu el miaj plej ŝataj estas melodeono, sed malgranda akordiono ankaŭ plaĉas. Nun

Joyce Bunting parolis kun **Ian Carter** dum la brita kongreso en Braĵtono.

mi ludas gitaron, bekfluton aŭ flaĝoleton, basgitaron kaj drumon. Sennombrajn kantojn mi verkis kaj ludis dum la jaroj, kun granda plezuro.

JB • Do, kia muziko plaĉas al vi?

IC • Popolan, klasikan, ĉian. Ankaŭ danc-muziko. Mi estas “vokisto”, do instruisto aŭ gvidanto, por dancfestoj – angle *barn dance* aŭ *ceilidh*). Prian retejon mi havas: *barndance.biz*.

JB • Brile! Nu, kiu estas via plej ŝatata verkisto?

IC • William Auld kaj aparte ties *Infana raso*. Ankaŭ Tibor Sekelj meritas pli vastan diskonigon, mi opinias. Interalie, li verkis ĉarmegan originalan rakonton pri ĉielarkoj, kiun mi anglan tradukis. Anglalingve mi multe ŝatas verkojn de Alan Bennett. Kontraste, teatraĵojn de Samuel Beckett mi ankaŭ ĝuas, se bone prezentataj. Mi memoras aktorojn Ian McKellen kaj Patrick Stewart en *Waiting for Godot*. La beketan humuron ili plene eltiris el la teksto, tiel ke mi ne povis ne ridegi.



ANDREO MARSHALL

JB • Se hazarde vi gajnus milionon da eŭroj, kion vi farus?

IC • Aĉetus propran domon. Mi luas en la nuna momento, kio ĝenas.

JB • Laŭ vi, kio estas la plej grava problemo, kiu frontas al Esperanto en la mondo?

IC • Apatio kaj nescio. Estas iuj homoj, kiuj rifuzas agnoski, eĉ ke Esperanto estas vera lingvo.

JB • Kaj en Britujo, kiel la movado ŝanĝiĝu en la estonteco?

Vizitante bierfarejon dum la Universala Kongreso ĉi-somere, lan vidis, kiel oni kreas la bieron *Anĝelus*, kiun la sama familia firmao faris por la unua kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Maró en 1905. La botela etikedo rigardeblas ĉe paĝo 19.

IC • Ni nepre perdu la ideon pri “membraro”, ĉar tio povus forturni tiujn, kiuj ne volus esti ano de iaspeca klubo. EAB estas karitata organizaĵo, kaj bezonas subtenantojn – amikojn, jes ja – sed miaopinie ne membrojn. Fakte, laŭ mi, ne estas multe da senco ĉe la ideo de “membrecó”, ĉar kontraŭ la kotizo, krom *La Brita Esperantisto*, kion oni fakte

ricevas? Kaj kiun rolon vere havas voĉdonado, krom rilate al elekto de la administra komitato?

JB • Kian rolon vi havos en EAB?

IC • Al mi oni jam donis la taskon esplori *branding* por niaj estontaj filmetoj, ktp. Tio signifas, ke ni deziras specon de cifereca filigrano aŭ “akvomarko” por iel distingi niajn kreaĵojn de tiuj de aliaj. Kaj kompreneble mi mem devos krei pli da filmetoj, ĉu por informi, ĉu por eduki. Mi helpos ankaŭ pensi denove pri niaj propraj ekzamenoj – por lernantoj iomaĝaj, ekde infanoj.

JB • Ĉu vi volas viziti la lunon aŭ alian planedon?

IC • Tute ne. Ĉi tiu planedo sufiĉas, dankon!

JB • Ĉu scienco interesas al vi?

IC • Jes, sed nur fojfoje. Ĉe la lernejo, tio estis mia plej malsukcesa fako.

JB • Ĉu politiko?

IC • Ne, ne, ne. Kiel oni scias, ke politikisto mensogas? Pro tio, ke ties lipoj moviĝas!

JB • Se vi regus la mondon, kion vi ŝanĝus – nur unu aferon?

IC • Maljustecon ĉiaspecan.

JB • Kiel vi malstreĉiĝas?

IC • Ege plaĉas al mi legi. Mi ja voras verkojn de Stephen King, ekzemple.

JB • Kio en via vivo estas via plej ŝatata donaco, kaj kiu donacis?

IC • Mia muzika sento, kiun mi heredis de mia avo.

JB • Kio estas via sekreta plezuro?

IC • Ĉokolado senlakta. Sed nur tia, kian kreas la kompanio *Hotel Chocolat*. ■

Ian Carter naskiĝis en Chesterfield, studis ĉe universitatoj en Southampton (BA Hons – franca/hispana, 1973), Sheffield (instruista diplomo, 1974), kaj Leicester (TEFL-diplomo, 1998). Poste li laboris kiel instruisto de la franca, la angla kaj muziko.

Dum 15 jaroj li instruis la anglan kiel duan lingvon en Saŭda Arabujo, Tajlando kaj Birmo. Li nun denove loĝas kun sia plej juna filo en Chesterfield, kie li private instruas matematikon, la anglan kaj de tempo al tempo komputilajn konojn. Li trifoje edziĝis kaj estas fiera patro de ses, avo de pli ol dek, kaj eĉ praavo de tri infanoj.

DUM LA SAMA JARO kiam mi laboris en Pekino kiel subredaktoro ĉe *El popola Ĉinio*, ekde oktobro 1981, la aŭtoritatoj decidis okazigi unu-jaran plentempan kurson por doni al aro da geinstruistoj el la tuta lando superan kapablon profesie instrui Esperanton. Tiutempe mia laboro neniel rilatis al tio. Aliflanke, por la monda esperantistaro la kurso memkompreneble estis interesa novaĵo. Poste mi informiĝis, ke politiko de Ĉinio estis havi instruistojn por ĉiu lingvo de la mondo.

Post pluraj monatoj, kiam tiuj geinstruistoj jam progresis, oni petis min en unu leciono instrui ilin pri fonetiko en Universitato de Pekino. Mi elfosis miajn fonetikajn sciojn, kaj la prezentado kontentige iris. La geinstruistoj jam bone povis interparoli en Esperanto. Unu afero restas ĉe mi en la memoro. Temis pri trafa kritiko fare de unu instruisto. Li demandis: “Kial vi prononcas la konsonantojn *k*, *p* kaj *t* kun elspiro?” Ho, ve!

Mi tuj komprenis, kion li celas. Devante tuj respondi, mi klarigis senspire, ke ja li pravas. Tio estas nebona kutimo ĉe diversaj eŭroplingvanoj, interalie angla-lingvanoj. Mi proponis la egale

ĝustan senkulpigon, ke tio, kvankam malkonsilinda, neniel kreas problemon, ĉar aspiracio en Esperanto ne ludas semantikan rolon. Sed en la ĉina orelo tio ĉiam sonas malĝusta, ĉar aspiracio ja ludas semantikan rolon en la ĉina lingvo. Li pravis, sed la afero ne gravegas, kvankam ĝi estas atentinda admono al mi kaj iuj aliaj eŭroplingvaj esperantistoj – kaj ofta manko en lernolibroj. Kaj ĝuste tiel, kiam mi lernis Esperanton, neniu atentigis min pri tio.

Oni plurfoje aranĝis renkontiĝojn por ni. Unu el la instruistinoj petis veni viziti min por interparoli kaj demandi. Mi kompreneble respondis, ke tio estas tute en ordo. Iun tagon ŝi venis, kaj ni babiladis dum eble horo. Ŝi revenis ankoraŭ unu- aŭ du-foje, poste ne plu, kaj mi ne plu pensis pri la afero.

Mi ne memoras, kiam mi denove aŭdis pri tiu tute ordinara kaj apenaŭ menciinda afero. Eble okazis du jarojn poste, kiam mi renkontis ĉinan konaton en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo aŭ en iu internacia renkontiĝo. Li ekrakontis pri alia vizito al mia ĉambro fare de afabla oficisto de Ĉina Esperanto-Ligo, kies ejo troviĝis en la sama korto, kie mi loĝis – la korto de la

Fremdlingva Eldonejo.

“Jes,” mi respondis.
“Mi memoras, ke li venis viziti min en mia ĉambro, kaj ni babiladis pri tio aŭ alio.” Sur mi tiutempe tio ne faris ian apartan impreson, kaj mi ne ligis lian interparolon kun io specifa.

Mia amiko plu klarigis. “Ĉu li ne parolis pri malfaciloj de ĉininoj edziniĝi kun eksterlandanoj?” Li pravis, kaj mi krome memoris, ke mi kontraŭdemandis pri ĉinoj kaj eksterlandaninoj. Mi memoris, ke li emfazis: “Pli malfacile ĉe virinoj.” Mi tiam ekrikanis pro finfina konsciiĝo. Nur tiam, longe poste, mi ekkomprenis, kion oni provis tute nenecese klarigi al mi.

Tiutempe en Ĉinio mi jam eksciis per legaĵoj, interalie en *El popola Ĉinio*, pri tiaj malfacilaĵoj, faritaj de la tiama ĉina registaro. Tiam, ekzemple, iradis inter Francio kaj Ĉinio diplomacia afero pri ĉinino, kiu enamiĝis al franco. Mi memoras eĉ leteron de franca abonanto de *El popola Ĉinio*, al kiu mi devis respondi. Li proteste malabonis pro la sinteno de la ĉina registaro. “Por franco la amo estas grava afero,” li skribis. Finfine la ĉina junulino tamen ricevis rajton



elvojaĝi al Francio - espereble en la brakojn de sia amanto.

Mi dum iom da tempo tenis kontakton kun tri el la geinstruistoj. Mi interŝanĝis kelkajn leterojn kun la ĉina instruistino, kiu venadis interparoli kun mi, kaj ŝi konfirmis la aferon jene. Ŝi volis veni babili ankoraŭ kelkfoje, sed iuj komencis moki, ke ŝi ekhavas ian rilaton kun mi. Sekve de tio ŝi ne plu venis. Des pli, ŝi jam havis fianĉon, kaj baldaŭ post la kurso en Pekino ili geedziĝis. Ŝi sendis al mi foton de ili du kun konatoj, biciklantaj el la geedziĝfesto.

Kiel oni subkomprenigu al homo ion imagatan, kion ĉi tiu tute ne bezonas scii? Eble la kialo de la afero kuŝis en tio, ke Ai Yuan estis la plej bela junulino en la kurso. ■

HC NENIUJ DU HOMOJ spertas precize la saman Universalan Kongreson. Ekzistas tiom da perpleksiga diverseco kaj oni devas elekti kion ĉeesti kaj kion ne ĉeesti.

Por mi preter ia dubo la plej interesa ero en la programo estis profesinivele ludata dulingva teatraĵo *Ĉiuj feliĉas*, kiu havis nekutiman strukturon kaj portis instruan mesaĝon. En tiu teatraĵo migrantoj el nespecifa fora lando parolas Esperanton, dum la policanoj, instruisto, lerneĵanoj kaj pastro parolas la italan. La italan mi povis kompreni pro projekciataj supertekstoj en Esperanto.

Mia edzino Patricia kaj mi ĝuis prezenton pri arkeologiaj eltrovoj pri la unua mondmilito kaj poste viziton al tiuj apudaj batalkampoj. Muziko kaj kantado ne mankis, kaj ni ambaŭ ĝuis kaj partoprenis kantojn de Jacques Brel en brilaj tradukoj kaj en teatro kaj sur publika placo en la urbo.

Ĉi-jaron mi havis pli da kontaktoj kun aziaj esperantistoj ol kutime. Estis plezuro ekkoni kantistinon **Li Renzhi** (Eruda Li) el Honkongo kaj rekonti japanan esploriston **Gotoo Hitosi**, kun kiu mi antaŭe interŝanĝis retmesaĝojn pri historiaj temoj. ■



PATRICIA CHAPMAN

IC Post kiam mia longtempa amiko **Andreo Marshall** proponis, ke ni kune ĉeestu la 100-an Universalan Kongreson en Lillo, norda Francujo, mi ekpanikis. Mia lasta UK okazis en 1973, en Beogrado, do mi komencis dubi, ĉu mi povos ĉion kompreni kaj, se jes, ĉu mi povos glite konversacii kun aliaj kun pli da sperto ol mi.

Kiam mi atingis la londonan stacidomon, kiun mi ŝerce sed ame nomas Sankta Pankreato, min atendis Andreo, kaj okazis la unua okazintaĵo de nia kongreso, eĉ

antaŭ ol ni alvenis al Lillo - t.e., ni vizitis biertrinkejon. Trinkinte - kaj ŝatinte - ni reiris por ekatendi en longega vico, kie ni renkontis Malcolm Jones kaj junulinon, kiu malkaŝis, ke ankaŭ ŝi ĉeestos la UK. Kiu ŝi estas, mi ankoraŭ ne scias, sed mi ja scias, ke ŝi ludas diatonan akordionon.

Nu, kun pasportoj kaj biletoj kontrolitaj, ni komencis denove atendi, feliĉe ne tro longe, por eniri la trajnon *Eurostar*, per kiu ni veturos tra la markola tunelo rekte al Lillo. Tiel veturi, per sufiĉe komforta vagonaro, ege plaĉas al mi - multe pli ol flugi per aviadilo.

Sed pri ĉio ĉi vi ne volas legi, mi certas. Kiel impresis min la kongreso mem? Nu, mi devas konfesi, ke mi fieris stari antaŭ 2500 homoj por saluti la kongreson nome de esperantistoj anglaj, kimraj, nordirlandaj kaj skotaj.

Kvindeko de britoj ĉeestis la centan Universalan Kongreson de Esperanto okazinta fine de julio en Lillo, norda Francujo. Jen du raportoj kun pluraj fotografiaĵoj.

Tamen, multaj aliaj programaj aranĝoj tute ne allogis min, precipe diskutoj.

Eĉ al la "kulturaj" prezentoj mankis io. Ekzemple, kiam la muzikduopo Kajto kantigis la ĉeestantaron, mi trovis tion tre banala, eĉ infaneca, iaspeca plej malalta komuna denominatoro. La nacia vespero same efikis sur min, kvankam la partoprenantoj evidente dediĉis multe da laboro kaj da tempo por pretigi sian kontribuadojn.

Por mi, pli interese estis renkonti ĝemelurban grupon, kiu rilatas al mia hejmurbo, Ĉester-fildo, kion organizis esperantistoj

Maldekstre: Plezuro estis por **Hilary Chapman** babilu kun honkonga kantistino **Li Renzi**.


UEA-prezidanto **Mark Fettes** alparolas la salonon Zamenhof je la solena fermo de la kongreso. Malantaŭ li staras statuo de giganto, kiu rolludis en la nacia vespero.





Ĝuis sian unuan Universalan Kongreson **Patricia Chapman**.

el Darmstadt (Germanujo). Ĉeestis ankaŭ francoj kaj aliaj nacioj. Plaĉis ankaŭ duontaga ekskurso al bierfarejo, kie oni ankoraŭ fabrikas la saman bieron, kiun la familia firmao faris por la 1-a UK en Bulonjo-ĉe-Marzo. Ĝi nomiĝas *Anĝeluso* kaj tre bongustas.



Lillo mem estis interesa, kaj ni elektis piede rondiradi dum duontaga ekskurso – sub la pluvo. Mi ĝuis la vidindaĵojn, krom la treege griza betona katedralo, kiu neniel rekomendindas.

Sed kio pri la kongresejo? Nu, mi ne multon volas diri, krom tio, ke la akustiko en la granda malplena spaco, kie oni eĉ prezentis kantadon, teatraĵetojn kaj komunan dancadon, estis fakte doloriga. Betonaj surfacoj, sen ia ajn mildiga ŝtofo, tute ne helpas disvastigi bonan sonon. Pri tio, sufiĉe!

Lasta punkto: kial esperantistoj foje opinias, ke ili sin vestu per strangaj, precipe verdaj, korpo-kovriloj? Se temas pri festo aŭ foiro, tion mi komprenas, sed laŭ mi tio ne rilatas al afero serioza, kiel universala kongreso. Se ni klopodas allogi novajn samideanojn, ĉu bone nin klaŭne prezenti?

Do – ĉu mi ĝuis la kongreson? Jes, plejparte. Ĉu mi ĉeestos UK en la estonteco? Verŝajne ne. Mi ne povos atendi dum plia jarcento por ĉeesti specialan jubilean kongreson, kaj mi dubas, ĉu ni disponas precipe pri la homfortoj por okazigi denove en Britujo eventon tian. ■

Simon Davies kaj **Martyn McClelland** babilis post la solena fermo.



La halo Michaux, kie okazis la movada foiro (fotita) je la unua vespero, kaj kie dum la cetero de la semajno koncertis diversaj artistoj malgraŭ malbona akustiko.

Jen la unua fojo, je kiu **Hilary Chapman** persone renkontiĝis kun la japana esploristo **Gotoo Hitosi**, kun kiu li jam interŝanĝis mesaĝojn rete.



PATRICIA CHAPMAN

EN MARTO mi pasigis semajnfinojn ĉe la Esperanto-domo en Barlastono. Ĉirkaŭ 10 homoj, du tagoj, unu misio: lerni Esperanton. Tamen antaŭ ol mi alvenis, mi konis nur unu vorton: *saluton*. Sed mi parolas aliajn lingvojn, kiel la francan kaj la hispanan, kio helpis al mi orientiĝi. Miaj scioj pri la franca kaj la hispana pli utilis, ol mi supozis, ĉar multaj esperantaj vortoj havas latinajn radikojn, do mi povis diveni la signifon de iuj vortoj.

Ĉiu studento havis propran, malsaman motivon por lerni Esperanton – por babili kun familio tra la mondo; ĉar ili ekinteresiĝis kiel infanoj; aŭ ĉar Esperanto estas paŝo por lerni aliajn lingvojn.

Sed kial *mi* lernas Esperanton? Nu, mi estas studento. Mi okupiĝas por mia magistro-disertacio pri “Tutmonda Ŝekspiro”, kaj mi volas rigardi la esperantajn tradukojn de *Hamleto*. La demandoj, kiujn mi respondos, estas “Kial traduki Ŝekspiron?” aŭ “Kio okazis al la lingvo inter unua kaj dua tradukoj?”

Por tion fari, mi rigardos la esperantan kulturon, ĝiajn metaforojn kaj la idiosinkraziojn. Ekzemple, mia *Lernu!*-instruisto, **Malcolm Jones**, informis, ke ĉe

Esperanto-kunvenoj ekzistas krokodiloj, aligatoroj kaj kajmanoj. [*Kajmanoj estas tiuj, kiuj uzas lingvon alian ol Esperanto en situacio, kiam la elektita lingvo estas nenies gepatra lingvo – Red.*]

Mi rekomendas la *Lernu!*-kurson, ĉar ĝi kreas etoson amikan por lerni lingvon kaj dume malfermas mensojn. Mi rekomendas ĝin aparte, se vi estas sub-25-jaraĝa, ĉar eblas senpage ĝin partopreni. Nun mi volas plulerni Esperanton, danke al Ŝekspiro kaj al **Tim Owen**, Malcolm kaj la aliaj bonaj esperantistoj. ■



TIM OWEN

David Warbuton aparte ĝuis esplori la enhavon de la biblioteko.

TIM OWEN



Mia Hewitt mergiĝas en Esperanto-studado.

TIM OWEN



Liz Tuckwell, Sophia Varthis (konata kiel **Christina**), **Mia Hewitt** kaj instruisto **Malcolm Jones** entuziasme “lernas” dum la printempa studsemajnfino.



Ĉe la maldekstra paĝo:

Phoebe Lamb kaj
Nina Shrewbury



Okazis en Barlastono en aŭgusto dua, kaj kredeble same ĝua, *Lernu!*-evento. Instruistoj denove estis **Malcolm Jones** kaj **Tim Owen**.

Partoprenis la dunivelan sesiaron naŭ lernantoj, inkluzive de kelkaj, kiuj "malkovris" Esperanton pere de la furore sukcesa interreta kurso *Duolingo*, kiu ekde sia lanĉo en majo varbis jam pli ol 100 000 lernantojn.

Maldekstre:

Malcolm Jones kaj
Kat Newbould

Sube:

Sam Poynter,
Vernon Smith
kaj **Tim Owen**





POR LA UNUA FOJO mi rigardis, okulglobo en okulglobon, grandan verdan tropikan ranon. Ĝi estis suĉfiksita al banĉambraj kaheloj per longaj piedfingroj.

Mia frato kondukis min tra sia bangalo en Norda Kvinslando, Aŭstralio, kie mi loĝos dum du-tri semajnoj.

“Jen Riko,” diris Ted.

“Ĉu vivanta?” mi demandis.
“Aspektas kiel plasta ludilo.”

Mi etendis fingron, tuŝis la estaĵon. Ĝi okulumis al mi. Krom tiu serena rigardo kaj eta signo de spirado, ĝi restis senmova – kontraste al saltemaj ranoj ĉeĥeĵme en mia ĝardeno.

“Prenu! Tenu!” Ted demetis Rikon de sur la muro kaj metis en miajn manojn. Ĝia glata haŭto estis malvarmeta. Kun kruroj etenditaj, ĝi estis pli ol manpleno.

“Hej! Vere peza,” mi diris.

“Ĉi tiu estas la giganta blanklipa hilo. Ni havas multajn en tiu mondparto. Tiu speco estas la plej granda arbo-rano en la mondo.”

Riko rigardis nin, ŝajne malestime, pro siaj horizontalaj pupiloj.

“Kion ĝi manĝas?” mi diris.

“Araneojn, insektojn, aparte grilojn kaj herbsaltulojn. Vi helpas min kapti, ĉu ne?” Ted reprenis

amfibion kaj zorge fiksita ĝin sur la kahelojn.

“Ĉu nokte vi metas ĝin eksteren?” mi demandis.

“Ne! Ĝi rajtas resti tiom longe kiom ĝi deziras. Ĝi foriros, kiam preta.”

“O-ho,” mi diris al mi, “tio signifas, ke post nelonge mi devos min duŝi kun rano.”

Mia frato pluinformis pri ranoj ĝenerale. “Ni tre maltrankviliĝas pro tio, ke malkreskas la nombro de ranoj. Sciencistoj opinias, ke fungo kaj poluado ilin mortigas, kaj ke kelkaj specioj baldaŭ malaperos. Tio okazas ĉirkaŭ la terglobo.”

Ted emas instrui pri la naturo. Foje mi forgesas, ke li laboris dum pluraj jaroj ĉe bestoĝardeno en Sidnejo.

“Kio okazos pri Riko, kaj ĝiaj samfamilianoj?”

“Ili ne estas sur endanĝerigita listo, dank’ al ĉielo. Vi trovas multajn en najbaraj domoj.”

Mia frato amis ĉiujn ranojn. Li povis rekoni specion simple per la grako.

“Ĉu Riko faras grandan bruon?” mi demandis.

“Jes ja. Dum la amsezono, vir-rano ekvokas posttagmeze por allogi partneron kaj povas daŭrigi ĝis frumateno. Riko ne estos ĉi tie,

kiam tio okazos. Nek vi estos," li aldonis malgaje.

Plaĉus al mi aŭdi ranĥorojn, sed mi estis vizitanta Aŭstralion dum malvarmeta sezono. "Ĉu vere, ke ili kantas tre laŭte?"

"Laŭte? Similas al bojanta hundo."

"Ĉu?" mi diris. "Fu! Mi supozas, ke vi alkutimiĝas al noktoj bruaj, kiam ili ĉiuj samtempe amindumas."

"Nu, estas multe pli brue en la arbaro. Multaj ranoj tie vivas."

Ni eliris en lian ĝardenon. Ekzotaj plantoj abundis. Estis varme.

"Riko-ranoj ne ĉiam havas piz-verdan koloron," diris Ted. "Se la vetero malvarmiĝus, la haŭto ŝanĝiĝus al oliv-verda, aŭ bronza, kaj ree al brilverda, kiam la vetero denove varmiĝus."

Baldaŭ mi estis rampanta sur pika herbejo, por kapti herbsaltulojn.

"Ĉu vi memoras, ke ni tiel faris, kiam ni gebubis, en longaj herboj?" mi diris. "Ni tre amuziĝis, ĉu ne? Mi ne estas nun same sukcesa."

"Vi agas bone." Ted koncentriĝis je bugenvila arbusto, brila pro purpuraj floroj. "Mi ofte trovas manton ĉi tie. Riko ŝatas."

Ni daŭre serĉis en amika silento, ĝis li diris: "Ĉu vi scias, ke rano ofte demetas kaj manĝas propran haŭton? Estas sufiĉe pena

ekzerco. Vidinda."

"Vi ŝercas! Insektoj kaj serpentoj, jes. Sed kiel rano povas vivi eĉ por kelkaj momentoj sen la haŭto?" mi diris.

"Nu, temas pri nur la plej ekstera tavolo. Same ni forviŝas eksterajn ĉelojn, kiam ni banas nin. Kiam rano demetas sian haŭton, ĝi aspektas kiel travidebla vualo. Rano devus konservi sian haŭton tre pura, ĉar ĝi enspiras tra la haŭto kaj sorbas akvon."

Ted metis ĵus kaptitan grilon en plastan skatolon kun manto kaj miaj herbsaltuloj.

"Nu, Riko estas arbo-rano, do mi supozas, ke ĝi ne naĝas," mi diris.

"Ho, ĝi ja ŝatas akvon - eble pro tio ĝi elektis la banĉambron. Foje ĝi naĝas en la neceseja pelvo."

"Uĥ!" Mi promesis al mi certigi, ke la neceseja kovrilo estas firme fermita antaŭ enlitiĝo.

Baldaŭ evidentiĝis, ke la plej grava malavantaĝo de Riko estas postfekaodoro. Abomene! Neniu volonte vizitus poste la banĉambron! Ted forigis la malpuraĵon.

Mi decidis prokraste min duŝi matene. Kiam mi eniris la banĉambron antaŭ matenmanĝo, mi zorge serĉis, skuis la duŝejan kurtenon, kaj rigardis en la pelvon. Evidente, Riko jam forsaltis pro siaj propraj aferoj. ■

JAM EN 1977 aŭdiĝis la voĉo de la *danĝera ul'* Ĵak Le Puil ĉe samnoma kasedo. Nun, preskaŭ 40 jarojn poste, aŭdiĝas la sama voĉo (eble ie-tie iomete streĉita por trafi la plej altajn tonojn) ĉe nova kompakta disko, *Sen elizi'*.

Ĝojige estas noti, ke temas pri la sama malrespekto rilate aŭtoritatulojn kaj la sama malpudoro rilate seksajn aferojn. Vi estas avertita: la danĝera ul', dank' al Io, restas danĝera, malgraŭ aĝo kaj ŝanĝiĝanta mondo:

**Nun infanaĝo estas for
En kelkaj dentoj 'stas dolor'
Demandojn ne plu faras mi
Sed gapas ni kiel simi'
Ĉar nun en Rabeleza land'
Vivu la angla por la kant'
Do mutus nun mia gitar'
Rivalos ne mi kun dolar'.**

El "Demandoj"

Tamen feliĉe tra 14 kanzonoj mutas nek la gitaro, nek aliaj instrumentoj, kiel balalajko, saksofono kaj fluto. Kaj en la kanzonoj ne temas simple pri ribelado, pri tio, ke "[n]un ni furzas reciproke / tutlibere laŭepoke" ("Furzoj iam kaj nun"). Temas ja pri amorado sed ankaŭ pri amo (Miĥalski-poemo, "Al virino") kaj



Recenzo Ĵak Le Puil. *Sen elizi'*.
Vinilkosmo, 2014. VKKD124-058.

pri kompatato kun la homa sorto (Boulton-poemo, "Hejmo"), kiam sonas malpli kolera, pli tenera voĉo. Kaj tra-trae sentebblas profunda plezuro pri la lingvo, ties sonoj, ties vortludoj ("Se ulo ...").

Akompanas la diskon libreto, kun tekstoj, fotoj kaj desegnaĵoj (de Serge Sire), foje maldecaj: do se vi kredas, ke ne kongruas karno kaj kanto, ne aĉetu.

Aliflanke, se vi volas, ke vin lulu ĉarrmaj' frrrancaj' konsonantoj' kaj vokaloj', dum vi kontaktiĝas denove kun via interna ribelanto, ja aĉetu. Kaj ĝuu! ■

ANTAŬ PLI OL dudek jaroj ni restis dum la somero ĉe mia bofamilio en Peruo. Tie okazis regule, ke mankis lumo en la domo, ĉar pro senpluveco en la montaro mankis akvo en la riveroj, kiuj nutris la hidroelektrajn centralojn. Klopodante skribi leteron per la lumo de kandelo, mi rimarkis kiom malforta estas ties lumo, kiom proksime ĝi devis stari apud la letero kaj al mia vizaĝo por funkcii, kiom mallume restis ĉio cetera en la ĉambro. Rimedo por mi ĉiutaga kaj memklariga tuj mankis; kaj tiun mankon mi forte sentis. Ekde tiam mi pli estimas la valoron de endoma lumo. Jen temo esplorinda: kiel ĝi komenciĝis, kaj kiel ĝi vere nun estas?

Supozeble la prahomoj rilatis al lumo kiel faras la bestoj; kiam mallumis, oni restis en la kuŝejo kaj dormis. Nur la malkovro de fajro ebligis al homoj uzi lumon por ŝirmi sin kontraŭ atakoj de pli sovaĝaj bestoj kaj certgrade fari taskojn normale plenumitajn nur ĉe taglumo. Tamen ŝajnas, ke ekde tre malfrue oni klopodis ankaŭ prilumi

la internon de la loĝejo. Jam dum la paleolitika epoko oni prenis kavigitajn roketojn, ostojn aŭ konkojn kaj enmetis muskon trempitan en besta graso, kiu tiam brulis kiel en lampoj. La romianoj uzis kandelojn faritajn el papiruso kaj fanditan abelvakson aŭ sebon, pretigitan el bovinoj aŭ ŝafoj. Poste aperis lampoj el terakoto kun meĉoj el lino aŭ linajo. Tiuj brulis pli longe kaj malrapide.

Abelvakso por riĉuloj, sebo por la aliuloj; tio validis ankaŭ en la Eŭropo de la Mezepoko. La malriĉuloj kavigis junkojn, tiam ade trempis ilin en varma sebo. El tiu laborego iĝis maldika kandelo, starante oblikve kaj donante malfortan lumon. Reprezentoj de vesperaj ĉambroskenoj en filmoj tute ne spegulas la realecon de la tiama vivo. La ĉambroj estis nek tiel helaj, nek havis tiom da kandeloj. Post sunsubiro ĉio endome estis pli-malpli mallume.

Tiuj kandeloj brulis nur dum ĉirkaŭ 20 minutoj, tempo-limo tiom bone konata, ke oni uzis ĝin kiel tempunu. Bruligi kandelon estis kvazaŭ bruligi monon; pro tio la esprimo – angla kaj zamenhofa – “la ludo kandelon ne valoras”.

Por la dungitoj de riĉuloj, porcioj da kandeloj – kaj kiom da ili –

Prelego aŭdigita dum la somera festivalo en Shallowford en aŭgusto 2013.

apartenas al la laborkondiĉoj. Altrangaj servistoj rezervis kandelstumpoj kaj vendis ilin por pligrandigi siajn enspezojn.

Krom ĉio ĉi la kandelo, kiel simbolo de lumo, gravas kiel simbolo de la lukto kontraŭ mallumo: kontraŭ la nevidata, nekonata, malbona. Ne hazarde

fari endomajn taskojn plejparte sen kandeloj. Pro tio oni ankaŭ nomis ĝin la Festo de Lumoj.

Kandeloj el sebo odoraĉis je karno kaj povis fandiĝi dum varma vetero. Necesis daŭre tondeti la meĉojn por eviti fumadon. En epoko, kiam abundis lignokadraj konstruaĵoj, oftis akcidentoj. Iam

Ingoj por junkokandeloj



estas, ke la partoprenantoj en diversaj religiaj kultoj uzas lumon por plifortigi sian kredon. La 2-a de februaro estas por la katolika eklezio Kandelfesto (la festo de la purigo de Maria), je kiu kandelojn por la venonta jaro oni metis antaŭ la altaro, kie ili beniĝis, aspergiĝis per sanktakvo kaj parfumiĝis per incenso. Tiel ili havis la potencon protekti kontraŭ tondro, fulmo kaj diversaj malsanoj. Tiajn kandelojn oni ankaŭ metis en la manojn de mortantoj por protekti la animon. Sed kial ĝuste je la 2-a de februaro? Ĉar nur ekde tiam eblis

dum la 17-a jarcento londona servisto nomita Obadja senpermesite portis kandelon al sia dormoĉambro. Tie ĝi falis kaj ekbruligis la littukojn. Obadja fulmrapide vekis kunserviston kaj ili ambaŭ estingis la fajron – laŭ tre natura metodo, kies detalojn mi ne bezonas priskribi.

Por prilumi pli vastan spacon necesis pligrandigi la lumon el kandeloj, kiu, eĉ se estis lustroj (kandelaroj), restis tre limigita. Kiom malforta estis kandelo, indikas tiu komparo: la lumoforto de moderna inkandeska ampolo de

60 vatoj (aŭ 13 ĝis 15 vatoj por kompakta fluoreska, do energiŝpara, ampolo) egalas la lumforton de 74 kandeloj. En Francio la Spegula Salono en Versajlo estis verŝajne la unua loko, en kiu la nivelo de prilumado proksimiĝis al tio, kio kontentigus nin nuntempe. Tiom bone funkciis la ĉieaj speguloj, ke la franca kortumo je la unua fojo regule festis ankaŭ vespere. Krom tio, zorge ciritaj oro kaj arĝento – ĉu sur teleroj, ŝlosiltruoj aŭ broditaj veŝtoj – celis la speguladon de kandela lumo.

Tamen por la plimulto da homoj malmulto ŝanĝiĝis inter la mez-epoko kaj la komenco de la 19-a jarcento. La pioniro de elektra lumo kaj kuninventinto de la inkandeska ampolo, Joseph Swan el Sunderland (1828-1914) skribis jene:

“La tagoj de mia juneco apartenas al la mallumaj jarcentoj, ĉar mi naskiĝis, kiam la junkolumo, la sebokandelo aŭ nur la flamoj el la kameno estis la kutimaj rimedoj por endoma prilumado. En la salonoj de eminentuloj, vaks-kandelo, aŭ malofte abundo da ili, mildigis la mallumon je solenaj okazoj; sed kutime la normalaj homoj, al kiuj mankis la persvadon de endoma brileco, de kiu ni profitas, enlitiĝis post sunsubiro.”

Fine de la 18-a jarcento oni aldonis al kandelvakson

spermaceton, balenvakson el la kristaligita oleo de la makrocefalo. Tiu produktis pli brila lumo kaj restis firma eĉ dum varma vetero. Spermaceto siavice anstataŭiĝis per stearino, el sebo kaj palmoleo, ĝis 1850. Tiam inventiĝis parafin-vakso, kiu brulis pli pure kaj pli regule. Dum tiu periodo ankaŭ okazis teĥnikaj plibonigoj en la formo de oleolampoj, tiel ke ili pli ofte aperis ene de la domo. Kiel brulaĵo oni uzis pli maldikajn oleojn, aparte parafino (aŭ keroseno), kiu abunde haveblis post la malkovro de vastaj naftokampoj en Usono en 1859. Tiu produktis bonan blankan senfuman lumon.

Tiaj lampoj tamen bezonis senĉesan bontenadon. Necesis tondeti la meĉojn, polurigi la latunon, purigi la lampkamenon. En grandaj kamparaj domoj aperis nova ĉambro por la purigado de lampŝirmiloj. En Belvoir Castle, loĝejo de la Duko de Rutland, respondecis la servistoj pri 400 tiaj lampoj. Do, se inter viaj prapatroj estis servistoj, verŝajne ankaŭ ili faradis tiun taskon. Helaj koloroj malaperis de la salonoj; nun, en la 19-a jarcento, superregis la malhelajn por kaŝi la ĉiean fulgon el la lampoj.

Tamen estis ankaŭ la destino de tiuj lampoj malaperi pro la alveno de la nova gaslumado. Tiu, produkto de la karbo, kiu antaŭenigis la

novan industriiĝon de la socio, jam prilumis urbajn stratojn ekde ĝia unua apero en Londono en 1807 por festi la naskiĝtago de la brita reĝo Georgo la 3-a. La entreprenisto malantaŭ tiu elmonro, la taŭge nomita s-ro Frederick Windsor, certigis siajn klientojn, ke gaso estas eĉ pli agrabla al la pulmoj ol normala aero. Ekde la 1840-aj jaroj gaslumoj komencis aperi en urbaj domoj. Baldaŭ ili enmodiĝis en burĝaj hejmoj. Revuo por sinjorinoj rekomendis ĉiam okazigi festojn ĉe gaslumo. Se estis taglumo ekstere, oni fermu fenestrokovrilojn kaj kurtenojn por pli bone elmontri la gaslustrojn. Simile, kaj similkiale, oni faris spektante televidon dum la fruaj 1950-aj jaroj.

La prilumado per gaso prezentis grandan paŝon antaŭen por la privata enĉambra vivo. Eblis multe pli facile legi, skribi aŭ kudri. Ĝi tamen havis malavantaĝojn. Ĝi estis eksplodema; ĝi poluis la aeron per forigo de oksigeno. Ne hazarde iĝis la aspidistro preferata salona planto, ĉar ĝi kapablis travivi eĉ ĉe malmulte da oksigeno. Se sinjorino foje svenis, tio povas esti ne nur pro strikte ŝnurita korseto sed ankaŭ pro manko da oksigeno en la ĉambro. Krome la elfluanta gaso daŭre kaj laŭte sibladis, malfaciligante ĉetablan konversacion pri la lastaj manieroj, aŭ la opero, aŭ eĉ pri tiu stranga fremdulo, kiu ŝajne



Kerosenlampo

inventis novan lingvon ...

Nur en la 1880-aj jaroj aperis la unuaj elektra lumoj: arklampoj por ekstere, kaj por la domo inkandeska ampolo en vakutubo, en kiu estis filamento

el volframo. Tiu ne estis la inventaĵo de unu sola persono, sed de pluraj laborantaj diversloke. Plej sukcesaj inter ili estis Thomas Edison en Usono kaj la supre citita Joseph Swan en Novkastelo, Anglio. En 1883 ili formis kunan entreprenon. Swan jam en 1881 prilumis sian domon, en Gateshead apud Novkastelo, per elektro; en 1883 la armilfabrikanto Armstrong faris same en sia nova kampara domo Cragside; tiu nun estas malfermita al la publiko kiel muzeo.

Eĉ en la jaro 1914, tuj antaŭ la Unua Mondmilito, elektra prilumado en la domo estis precipe por riĉuloj. Veran progreson en Britujo oni atingis nur en 1926, kiam la registaro starigis centran komision por normigi la produktadon de elektra energio per racie distribuitaj centraloj, kaj kreis nacian reton por interkonekti diversajn energifontojn kaj etendigi ilin en la kamparon.

Elektra prilumado baldaŭ furoris – tiom, ke foje certaj riĉuloj instaligis la lumojn en la domo kaj nur poste konstatis, ke ne estis elektra centralo en la regiono. Nescio regis pri tio, kiel funkciis la lumoj. Afiŝoj staris en la domo kun la novaj lumoj por prie informi. Jen unu el ili:

Tiu ĉambro estas ekipita per Edison-a elektra lumo. Ne provu bruligi lumon per alumeto. Necesas nur turni la ŝlosilon sur la muro apud la pordo.

Aldone, malgrandlitere:

La uzado de elektro por prilumado ne difektas la sanstaton kaj ankaŭ ne efikas sur la dormo.

Notinde estas, ke aparte virinoj rimarkis la avantaĝojn de elektro por dommastrina laboro. Ĝi estis pura, praktika kaj senodora; krome eblis plenumi taskojn dise dum la tago; ne plu necesis pretigi la vespermanĝon jam tagmeze. Oni nun faris ĝin vespere kaj restis libera tagmeze por fari ion alian laŭ elekto. Tiu entuziasmo flanke de virinoj kondukis al la starigo de la Elektra Asocio por Virinoj, kies celo estis eduki aliajn virinojn (kaj foje ankaŭ virojn) pri la avantaĝoj de elektra energio. Inter la eldonajoj de la Asocio estis la libro *La Elektra Epoko por Virinoj*, kiu aperis en 1931, kaj du libretoj *Receptoj por la Elektra Kuirforno* kaj *Elektro sen Larmoj*.

La efiko de elektro sur la ĉiutaga vivo de multaj virinoj estis signifa. Rimarkinde estas, ke du aliaj novaj servoj kiuj siatempe ankaŭ transformis la endoman vivon de virinoj – gaso kaj akvo – ne ricevis tiun apogon kaj antaŭenigon. Elektro estis io aparta. La Elektra Asocio por Virinoj kampanjis por la disvastiĝo de elektra energio kaj la pliboniĝo de elektraj iloj. Ĝi eldonis librojn kaj revuojn por klarigi la mirindaĵojn de elektra energio al publiko plejparte ankoraŭ nescia. Ĝi ankaŭ apogis la malmultajn virinojn, kiuj laboris ene de tiu industrio. Sed precipe ĝi okupis sin pri la elektro-uzantino en la domo.

Tiam ankoraŭ necesis varbi por tiu novaĵo. En iu rakonto pri Sherlock Holmes staras la frazo, “Holmes deprenis la ŝaltilon, kaj la tuta ĉambro tuj inundiĝis per elektra lumo.” Neniu el ni parolus tiel nuntempe. Sed Conan Doyle, kiu mortis en 1929, bone memoris la epokon de malfortaj kandeloj, fumantaj lampoj kaj siblanta gaso; li ne povis ne primiri la novan elektron. Laŭ Lenino komunismo estis “socialismo plus elektro”.

Intertempe konstateblas, ke elektro egale necesas por kapitalismo aŭ eĉ por faŝismo. Ĝi iĝis nepraĵo de la moderna vivo. Ni ĉiuj kreskis kun ĝi kaj profitas de ĝi, tiom ke ni nur rimarkas ĝin,

kiam ĝi neatendite mankas. Laŭdinda situacio, ĉu ne? Atingo, pri kiu la homaro juste fieras: kompreneble. Sed ni esperantistoj ankaŭ fieras pri nia kapablo pensi alimaniere. Do starigindas la demando: kion ni per tio perdis? Kio mankis al tiu endoma vivo daŭre prilumata ĝis en ĉiun anguleton per forta, senflagreta blanka lumo?

Unue ni perdis rutinon en harmonio kun la naturo. Industria socio devigis nin labori ne laŭ la lumo sed laŭ la horloĝo, tiel ke skiplaboristo restas maldorma dumnokte kaj apenaŭ spertas taglumon.

Due la rakontarto suferis. Tradicia rakontisto rakontis sentekste, parkere; aŭskultantoj faris proprajn mensajn bildojn en la mallumo. La disvastiĝo de radioaŭskultado portempe revivigis tion, sed ekde la apero de televido niaj distraĵoj dependas ĉiam pli pri bildoj kaj malpli pri la imagopovo; kaj nuntempe ĉiu elektra ilo havas propran prilumatan ekranon. Homoj distriĝadas pli ol iam ajn antaŭe; sed se distraĵo mankas, ili tediĝas pli draste ol iam ajn antaŭe.


Trie suferis ankaŭ la kutimo de komuna kantado kaj muzikfarado, por kiu lumo ne ĉiam necesas. Muzikistoj povas ludi instrumentojn en mallumo, kondiĉe ke ili ludu parkere; kaj por kunkanti gravas



Elektra lumo el la frua 20-a jarcento

aŭskultado pli ol rigardado. Iompostiome muziko iĝis afero por profesiaj distrantoj (kaj pasivaj aŭskultantoj-rigardantoj) anstataŭ io neperfekta sed hejmfarita.

Konstateblas, ke sur tiu kampo kiel sur aliaj, progreso mirigas nin, sed ĉiam je certa kosto. ■



Veronika Poór

Gratulon ... al ni mem!

Multaj legantoj de *La Brita Esperantisto* favore prikomentis ties novan aspekton. Ankaŭ **Stefan MacGill**, vizprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), gratule mesaĝis (2015-04-13): “Dankon pro *LBE* kaj *Update* – mi ne vidis ilin en jaroj – la nova aspekto estas okulfrapa! Mi tuj plusendis ilin al nia estraro (kaj redaktoro), kiel modelo de bona paro da enlandaj revuoj – por interno kaj ekstero.

“Revuo *Esperanto* ja havas alian rolon ol landa bulteno, sed mi fidas, ke nia redaktoro prenos la ekzemplon pri *LBE*, almenaŭ rilate la litergrandecon kaj spacigon, por kompreni, ke multaj el la legantoj havas okulojn pli lacajn ol ili iam estis! Gratulon pro la bona laborado!”

Dankon al **Tim Owen**, kiu plusendis la vicprezidantan mesaĝon al la redaktoro de *LBE*, kaj kiu kun **Simon Davies** kaj **Ava Rowell** respondecas pri la nova aspekto de la revuo.

Gratulon kaj sukceson ...

... ni deziras al **Veronika Poór**, kiu ekde la komenco de 2016 fariĝos direktoro de la centra oficejo de UEA en Roterdamo. Ŝi

sekvos la multjare servintan direktoron **Osmo Buller**, al kiu ni deziras pacan kaj agrablan emeritiĝon. Ĉeestintoj de la brita kongreso de 2011 en Eastbourne eble memoras, ke inter la eksterlandaj gastoj nombriĝis Veronika, tiam aktiva en Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Dum la kongreso ŝi estis fotita (maldekstre).

Lingvo-lanĉilo

Aperis artikolo en la fakrevuo *The Linguist* (Vol. 54, 1, 2015) pri la projekto *Springboard to Languages*. Sub aŭspicio de *Springboard*, oni instruis en elementaj lernejoj Esperanton kadre de lingvo-konsciiga programo. La verkinto de la artikolo, Amanda Barton, fakulo ĉe la Universitato de Manĉestro, science kontrolis la projekton kaj en la artikolo pozitive pritaksas la rezultojn. Tamen ŝi avertas, ke, se oni volus pli vaste enkonduki la *Springboard*-projekton, necesus “plene revizii, kiel gepatroj, lernejoj kaj pedagogiaj planistoj komprenas la celojn de lingvo-lernado” (p. 19). Dankon pro la informoj al **Angela Tellier**.

Krizo ... kaj Esperanto

Dankon al **Hilary Chapman** –

kie kaj kiel li elfosas informerojn tiajn? – pro la novaĵo, ke ekzistas insulo kun la nomo Krizo. En majo, ĝi estis afliktita de terura epidemio: tiel nomata Malsana-epidemio. Tamen feliĉe la loĝantaro ne suferis, ĉar Krizo estas fikcia insulo kreita de krizo- kaj katastrofo-konsultejo. La kompanio celas virtuale testi, kiel reale reagi al veraj krizoj kaj katastrofoj. La insulo “situas” inter Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Esperantaj vortoj supozeble donas iom da fremdeco al insulo, kiu havas longan historion, ekde la momento, kiam Kapitano Cook ĝin malkovris. Tiuj, kiuj volas viziti (ne iru sen asekuo), trovos ĉi tie detalojn:

lbesp.org/insulo-krizo

Mortemulo

Denove dankon al **Hilary Chapman**, kiu atentigas pri raporto en la gazeto *Sunderland Echo* (2015-05-19) pri studento, Shaun Chipp, kiu kreis kvarkanzonan diskon titolitan *Mortemulo*. Menciite en la raporto estas, ke la vorto devenas de Esperanto. La 19-jarulo lanĉis la diskon kadre de kolegia kurso kaj, vendante ĝin, jam rikoltis £300 por la organizaĵo *Cancer Research*.

La angla lingvo

“Ni perdas la kapablecon paroli kun la mondo” – tiel la titolo de

artikolo en *The Guardian* (2015-03-03). Verkis ĝin eksa ambasadoro, Oliver Miles, kiu notis: “En mondo, kie ‘ĉiu parolas la anglan’, malfacilas al brito sufiĉe sin ekzerci en fremda lingvo por senti sin komforta ĝin uzi. ... Tamen scipovi lingvon estas ŝlosilo, kiu malfermas la pordon.” Indas tion memori, kiam oni argumentas, ke superfluas lingvolernado, ĉar la mondo koloniiĝis de la angla.

Ĉiu parolas la anglan (1) ...

Eble, sed ne en Britujo. Raportis *The Guardian* (2015-06-19) ke en Little Horton, kvartalo de Bradford, el preskaŭ 20 000 loĝantoj 35% ne posedas la anglan kiel ĉefan lingvon kaj 12% ĝin malbone aŭ tute ne parolas.

Ĉiu parolas la anglan (2) ...

Preskaŭ duono de la kuracistoj el Eŭropa Unio, kiu celis labori en Britio, ne ricevis permesilon, ĉar ili ne povis montri sufiĉan kapablon en la angla lingvo. Raportis *The Guardian* (2015-07-27), ke en la pasinta jaro nur triono de la kandidatoj el Italujo permesilon ricevis, kaj nur iom pli ol kvarono el Francujo. Plej sukcesis kuracistoj el Pollando kaj Germanujo.

Ĉiu parolas la anglan (3) ...

Eble, sed foje ili nek volas nek kapablas. Laŭ *Philippine Daily*

Enquirer (2015-06-23), en artikolo titolita “Why English is so very hard to teach and learn” (“Kial tiom malfacilas instrui kaj lerni la anglan”), la aŭtoro atentigas pri la sinteno de lernejoj, kiuj taksas malpatriota uzon de la angla. La aŭtoro kulpigas erarojn en lerno-libroj; instruistoj, kiuj malbone prononcas la anglan; kaj komputilajn ludojn, kiuj ne firmigas lingvaj kaj komunikajn principojn. Dankon al **Hilary Chapman** pro la ligo! lbsp.org/pde-angla

Ĉiu parolas la anglan (4) ...

... se nur malbone en Panĝabo, Barato. Laŭ artikolo en *The Tribune* (2015-06-25), trovita de la nelacigebla **Hilary Chapman**, instruistoj faris meze 60 lingvaj erarojn en 150-vorta raporto. Eraroj inkluzivis “lake of interest”, anstataŭ “lack”, kaj “Students parents are not educational so that time table should be fresh before resess”. La ministerio pri edukado kulpigas instruistojn, kiuj mem malperfekte regas la anglan, pri malbonaj ekzameno-rezultoj kaj falantaj niveloj en la angla.

lbsp.org/lake-of-interest

Ĉiu parolas la anglan (5) ...

Raportite en *The Guardian* (2015-07-20): “La Oscar-nomumita aktoro Terence Stamp montris sian maltrankvilon pri la plurkultura

identeco de Londono kaj plendis, ke neniu en la ĉefurbo parolas la anglan”. Troigo, evidente ... sed ...

Ne nur la anglan parolu policianoj

Edmund Grimley Evans

atentigis pri raporto en *The Guardian* (2015-07-21) pri trejnado de londonaj policianoj. Kadre de eksperimenta programo estontaj rekrutoj parolu ne nur la anglan sed ankaŭ unu el 14 aliaj lingvoj, inkluzive de la araba, la bengala, la germana, la greka, la hebrea, la pola kaj la turka. Interese, ke en la listo aperas nek la franca (la lingvo, kiun la rekrutoj estos plej verŝajne tanĝintaj en siaj lernejoj) nek aliaj lingvoj el orienta Eŭropo. Pri la nivelo de la lingvo-scioj silentas Scotland Yard.

Jes ... kaj ne(s)

Sursojle de la Esperanto-tago (la 26-a de junio) publikigis la *i*-ĵurnalo (reta varianto de *The Independent*) du-kolumnan, verdkoloran panelon pri Esperanto. Videblis bildoj pri Zamenhof kaj pri la flago, kun informoj pri la lingvaj originoj de Esperanto kaj la nombro de parolantoj. Tradukitaj estis bazaj frazoj kaj vortoj ... nur domaĝe, ke la esperanta vorto por la angla “no” aperis kiel “nes”. Dankon al **Joyce Bunting** (fakte ŝia edzo **Alan**), kiu rimarkis la paĝon (ankaŭ al **Lenio Marobin**, kiu same informis). ■



Partoprenantoj en la 55-a somerlernejo vizitis la bibliotekon de Esperanto-Asocio de Britio.

De maldekstre: **Jack Warren** (instruisto), **Andrea Schmidt**, **Mikaelo Sims**,
Mikaelo Heary, **Liz Tuckwell** kaj **Joyce Bunting**.